



PROČ ZŘIZUJEME MÍSTNÍ SKUPINY ?

Členové místních skupin ČES a ostatních EK si zvykli pracovat spíše živelně a podle vlastního uvážení. Většinou sice měli určité plány činnosti a projednávali je se svými zřizovateli, zato již méně s ústředím svazu. Tím se dosud stává, že funkcionáři ČES jsou často postaveni před hotovou věc, leckdy jen několik dnů před akcí, a výsledkem bývá - kromě nepříjemností při dotazech správních orgánů - chaos. Termíny jednotlivých akcí se překrývají nebo zasahují do akcí pořádaných svazem a způsobují tak zmenšenou účast na obou stranách.

Na veřejnost takové akce působí nevýrazně a nepřesvědčivě. Věřím, že každý soudný člověk, který to s naší organizací myslí dobře, bude souhlasit, že v takovém případě i méně je více. To neznamená, že svaz hodlá omezovat činnost EK nebo bránit iniciativě. Chce jenom vnést určitý řád do celé činnosti svazu a tedy i do činnosti místních skupin.

Proto je nutné, aby všechny MS a ostatní esperantské kroužky vypracovaly co nejdříve návrhy na pořádání akcí a zaslaly je sekretariátu ČES nejpozději do konce listopadu.

Návrh musí obsahovat :

- a) námět setkání a zda se počítá s oficiální účastí zahraničních hostů
- b) termín a místo setkání
- c) zprávu, že akce byla projednána s odborem pro vnitřní věci příslušného NV.

Podle došlých plánů bude sestaven kalendář akcí a uveřejněn pravděpodobně jako příloha Starta. Proto během roku 1974 již nebude možno dodatečně plánovat žádná další setkání.

Někdy dostávám informace a dotazy, týkající se zřizování místních skupin. Ně kterým pisatelům není jasné, proč se takové skupiny vlastně ustavují a co z toho vyplývá. Vyskytují se i dotazy, co bude s těmi kroužky, které odmítnou stát se místní skupinou ČES.

Nikdo se přitom nepozastavuje nad tím, že např. všichni odboráři jsou také členy svých odborových svazů. Mnohé by jistě překvapilo, kdyby si skupina lidí říkala odboráři, vyvíjela nějakou činnost a nebyla členem odborové organizace. Ve skutečnosti to ani není možné. A přece, v naší organizaci taková živelnost, lépe řečeno neukázněnost, ještě stále přetrvává - ke škodě nás všech !

Jedině organizovanost a jednotný postup může přinést výsledky, jakých si všichni přejeme. Jen kroužek, který je skupinou svazu, má právní podklad pro jednání, případně zastupování svazu v místě své působnosti. Pro členy svazu z toho nevyplynou žádné další finanční závazky, jak se někteří obávali.

V podstatě jde o akt, kdy kroužek či klub písemně požádá rozhodnutím členské schůze o uznání statutu místní skupiny. Většinou půjde o MS bez právní subjektivity, protože EK jsou současně napojeny na svého zřizovatele.

Stát se místní skupinou neznamená tedy nebýt zároveň kroužkem ZK ROH ap. Naopak, svaz má velký zájem, aby skupiny působily v rámci společenských zařízení a organizací. To ovšem znamená i povinnost být plnoprávným členem svazu. Máme zato, že každý esperantista, který se za takového počítá a chce něco pro svůj svaz udělat, musí počítat i s tím, že vyrovná svůj členský příspěvek, který činí měsíc-

(dokončení na str.5)

ESPERANTO NE VENKOS SEN PACO

En ĉeesto de reprezentantoj de la jugoslavia registaro, beograda magistrato, diplomatoj kaj entute 1638 esperantistoj el 43 landoj komencis siajn aborojn la ĉijara 58-a UK de Esperanto en Beogrado.

La reprezentanto de Socialista Unuiĝo de Jugoslavio, k-do Milatoviĉ, varme salutis la kongresanaron, substrekis la internaciisman kaj porpacan mision de Esperanto kaj transdonis koran saluton de la jugoslavia prezidento Tito.

Sekvis salutparoloj de 18 diplomatoj; preskaŭ ĉiu el ili aldonis kelkajn frazojn esperantajn. En perfekta Esperanto tralegis sian mesaĝon la reprezentanto de Usono. Inter la salutintoj de la landaj asocioj estis ankaŭ la delegito de ĈEA, D.Koĉvara, kies mallonga, sed enhavoriĉa raporto pri la agado kaj programo de ĈEA estis varme aplaudita.

La plej amasan ĉeeston dum la kongresa semajno altiris la Dua Ĝenerala Kunveno, kies temon "Lingva egalrajteco en teorio kaj praktiko" elokvente prezentis d-ro J. Wells, Londono. La delegitoj el diversaj plurlingvaj ŝtatoj klarigis la lingvan situacion en siaj landoj. Ĝeneralan ekscitigon provokis je la diskutfino la rimarko de esperantisto el Singaporo, ke kompare al la lingva situacio en Hindio, Indonezio kaj Hinduĉinio la lingvaj problemoj en Eŭropo estas bagatelaĵoj.

Ne tiel efika kaj interesa estis la debato je la temo "Ĉu Esperanto povas sukcesi sen lokaj grupoj?" Ĉiuj diskutantoj senescepte akcentis la neceson de bone organizitaj kaj laborantaj lokaj grupoj; do la temo estis okulfrape mise starigita.

Multnombran ĉeeston kaj aktivan interreson allogis la kunveno de Mondpaca Esperantista Movado. Ĝia prezidanto k-do N. Aleksiev emfazis la malstreĉiĝon de la nuntempa internacia situacio dank' al la senlaca klopodo de la socialismaj landoj kaj ilia principa porpaca strebado. Li nerefuteble kaj brile dokumentis la simplan fakton, ke Esperanto sen paco ne povas disvastiĝi kaj venki! Do estas nepra devo de ĉiu esperantisto aktive batali por la paco en la tuta mondo.

En la Internacian Komitaton de MEM estis novelektitaj por ĈEA M.Josková kaj O. Kníchal, al la virina komisiono de MEM M.Josková, al la sekretariaro de MEM M. Šaturová el AĜESSR.

Inter la aliaj kongresaj aranĝoj ni menciuj la Interkonan Vesperon, Jugoslavian Vesperon (brila kaj neforgesebla), Oficialan Balon kaj Internacian Vesperon.

Kaj la partopreno de la ĉs. esperantistoj? Ĉeestis verŝajne 12-15 el ĈSSR. En Belartaj Konkursoj E.V.Tvarožek gajnis la 3-an premion en originala poezio kaj d-ro L.Izák la 3-an premion en originala dramo. Dum Internacia Vespero sukcese rolis M.Smyčka kune kun la slovaka kvarteto "Esperanto"; la lasta sukcese muzikis ankaŭ dum la Oficiala Ballo. Mi nur forte bedaŭras, ke inter la prelegantoj de ISU daŭre mankas la ĉs. esperantistoj. Kial?

Spite al la foresto de la UEA-prezidanto I.Lapenna kaj de la KKS M.Nevan la kongresa programo marŝis bone: pruvigis, ke UEA havas sufiĉe multnombran stabon de kapabluloj por aranĝi kaj gvidi la Kongresojn.

Kaj fine la mankoj: malgranda ĉeesto el socialismaj landoj, manko de rabato sur la beogradaĵoj kaj aŭtobusoj, manko de kongresa poŝtmarko kaj hontinda situacio en studenta hejmo en Novi Beograd, kie loĝis centoj da gekongresanoj...

Tamen ĝenerale - la Kongreso sukcesis. Venontjare do al la 59-a en Hamburgon kaj en 1975 - verŝajne en Sofion!

J. Tomčík

RENKONTIĜO ĈE LA JUNULARFESTIVALO

Junaj esperantistoj en Berlino

Kiel membro de turisma delegacio de Socialisma Junulara Ligo mi partoprenis la renkontiĝon de esperantistaj gejunuloj en Berlino, kiun ĉeestis 120 personoj el 16 landoj.

R.Corsetti, la vicprezidanto de TEJO, substrekis en sia parolado gravecon de la kontraŭimperiisma kaj kontraŭmilitisma agadoj de la junularo.

Kunvenis aparte la delegitoj el la socialismaj landoj por preparoli la reciprokan kunlaboron. H.Eichhorn el GER parolis pri la popularigo de sia lando helpe de Esperanto. La FDJ-representanto menciis la apogon al la esperantistoj Intiman kunlaboron kun sialanda junulara organizaĵo (ekz. aranĝo de internaciaj laborbrigadoj) konstatis la bulgara delegito. La sovetia reprezentanto raportis pri la kursoj de E-o aranĝataj de

Komsomolo en pioniraj domoj, pri la someraj Esp. tendaroj, seminarioj, renkontiĝoj ks.

Okaze oni spektis filmon en E-o pri la junularo en GDR. Tre agrabla atmosfero daŭris ĝis malfruaj vesperhoroj, kiam la partoprenantoj ekiris al la stratoj de Berlino manifesti kun la ceteraj por la paco kaj amikeco. V.Vitek

Kontrakto preparata

Antaŭnelonge ni skribis pri la kontakt-oj ligitaj inter ĈEA kaj la Socialisma Junulara Ligo (SJJL). Temas pri la reciproka intereso efike kunlabori sur la tutŝtata nivelo kaj subskribi la respektivan - jam ellaboritan - kontrakton. Ĝi ampleksus ambaŭflanke avantaĝan solvon rilate al informa, populariga kaj materia aspektoj. La funkciuloj de ĈEA klopodos realigi la kontrakton ankoraŭ ĉi jare. Pri la rezultoj ni ĝustatempe informos.

BELA SEMAJNO EN Bystrica

Dum la lasta aŭgusta semajno travivis en Banská Bystrica (meza Slovakio) kelke da niaj anoj belegan, gajan kaj interesan tempon. Ili partoprenis kultur-turisman festivalon, kiun preparis AESSR kun la loka ER.

Kvankam tiu ĉi kunveno estis siaspece la unua kaj fakte kreis la tradicion de similaj semajnoj, partoprenis ĝin pli da homoj ol oni ĝenerale supozis. Ni kunvenis tie kun aliaj kvin nacioj, montrante tiel al la neesperantistoj utilecon de la internacia lingvo kaj de ties organizita movado.

La arango sendube postlasis profundan impreson je ĉiuj partoprenantoj ne sole pro la beleco de la naturo kaj la historiaj atentindaĵoj, sed ankaŭ pro la vere homaj kaj amikaj rilatoj, ligitaj dum tiu ĉi semajno, kaj pro la sento, ke samideanoj el AESSR faris en Banská Bystrica vere respektindan laboron por la interhoma konatiĝo, por la movado kaj por la popularigo de Esperanto.

Oni sole deziru, ke ankaŭ venonte regu same amika etoso kaj ke rezultu same elstara sukceso, se ne pli granda.

Z. Krímský

AL LA 3a JARDEKO EN SET LANĈOV

Vere, la tria, ĉar jam la 21an fojon ekflirtis la Esperanta flago super la loko bone konata al multaj esperantistoj: la Vranova baraĵlago apud Znojmo (suda Moravio).

Frekventis la tendaron 105 en la 1-a kaj 100 en la 2-a etapo kun superega ĉesto de la gejunuloj. Venis ankaŭ gastoj el GDR, Jugoslavio (pli granda grupo), Pollando, Bulgario, Italio, Aŭstrio, Danlando kaj eĉ el Usono.

Kiel tendarestroj funkciis L.Bala (1-a et.) kaj J.Vitek (2a), pedagogiaj estr-oj J.Jičínský (1) kaj J.Chvosta (2), ekonomia estro P.Sittauer (nelacigeble dum ambaŭ etapoj) kaj programvidantoj P.Hečko (1) kaj K.Jedičková (la konata "hajado").

La tendaranoj certe estis kontentaj finkonstruinte la sanitarajn aranĝojn kaj instalinte elektron kun akvokondukilo en la tendara kuirejo.

Ankaŭ la nivelo de la instruado plialtiĝis kompare kun la pasinta jaro. Oni instruis en porinfana, A, B, C kaj D + E kursoj.

Ornamis la tendaran etoson la tradiciaj tendarfajroj, maskobalo kaj la ekskursoj al Bítov, Znojmo kaj Třebíč. Pri la UK en Beogrado informis D.Kočvara, pri la festivalo en Berlino V.Vitek kaj pri la TEJO-kongreso J.Řeháková.

(laŭ informoj de inĝ.M.Strnadová kaj M.Juřenová)

STARTO kvinjara

En oktobro 1968, do antaŭ kvin jaroj kaj en sufiĉe komplikaj cirkonstancoj, aperis la 1-a numero de stencilita gazeteto Starto, tiam organo de la Preparkomitato de ĈEA. Tri monatojn poste ĉesis aperi la rubriko de ĈSEK en NED ĜLE kaj la novnaskita informilo baldaŭ - post la konstitua kongreso de ĈEA en marto 69 - fariĝis asocia organo. Ekster sia misio enianda ĝi plenumadis ankaŭ rolon de informanto eksterlande, penetrante al la plej foraj lokoj, plej ofte al Sovetunio. Krom multaj ĉs.aŭtoroj kunlaboris sur ĝiaj paĝoj ankaŭ elstaraj esperantistoj eksterlandaj kiel W.Bormann, K.Kalocsay, I.Lapenna kaj Régulo-Pérez.

(r)

POR LA ZAMENHOFA ESPERANTO

(Ni petis la aŭtoron, antaŭnelonge novelektitan membron de Akademio de Esperanto, ke li kontribuu al la diskuto pri neologismoj sur la paĝoj de Starto. Jen lia respondo) :

En la historio de Esperanto oni povas distingi tri naturajn periodojn: la antaŭmilitan, intermilitan kaj postmilitan.

La antaŭmilita tempo estis la knabaj jaroj de la lingvo. La intermilita tempo estis periodo de intensa literatura florado. Nun, kiam ni rerigardas, tiuj du periodoj aspektas preskaŭ idilie. Tiurilate ili diferencas de la lastaj 30 jaroj, kiuj estas ne nur dekadaj de abrupta, ŝtorma lingva evoluo, sed antaŭ ĉio eĉ dekadaj de iom arbitra, ne ĉiel taŭga kaj konvena, ofte nepripensita kaj ne ĉiam bonŝanca perforta evoluiĝado. En tiuj tridek jaroj Esperanto tre riĉiĝis, sed samtempe ankaŭ grave kaosiĝis kaj malsimpliĝis. Kaj iuj lastaj tendencoj, aperantaj en ĝi, estas jam tute okcidentalismaj kaj kontraŭfundamentaj :

- 1) Esperanto komencas perdi sian unikan "popolan karakteron" kaj kun ĝi, bedaŭrinde, ankaŭ sian unuan kaj ĉefan ekzistrajton kaj sian plej grandan forton.
- 2) La unua parto de la 15-a regulo estas deklarata preskaŭ la sola leĝo de la lingvo, dum la dua parto de la sama regulo samtempe estas sisteme ignorata kaj preskaŭ subigata.
- 3) Internacieco (laŭeble ia limigita "franca" internacieco) estas konsiderata la baza principo de la lingvo, malgraŭ tio, ke la ĉefaj principoj de Esperanto estas autonomeco, sistemeco, skemeco, reguleco, senescepteco, simpleco, koncizeco kaj raciismo.
- 4) Oni grekigas la vortprovizon de Esperanto, kreante tiel apartan "grekan ĵargonon" kaj konfuzante tiel la klasikan vortaron esperantan.
- 5) Oni trudas al Esperanto ruzan konstruon de la tiel nomataj pseŭdoprefiksoj, pseŭdosufiksoj, pseŭdoprepozicioj kaj "internaciaj vorteroj", kiuj reprezentas fakte tute novan, neregulan, tipe okcidentalisman derivadsistemon, absolute fremdan al la Zamenhofa.
- 6) Oni ne rekonas la esencan diferencon inter la lingvoj naciaj kaj la Lingvo Internacia.
- 7) Ĉiam pli kaj pli oni vadas en la marĉojn de evidenta lingva naturalismo, kvankam Esperanto estas lingvo tipe skemisma kaj raciisma.
- 8) Samtempe, iom post iom, oni senvalidigas la bazajn principojn de la Fundamento.
- 9) Pri la lingvaj demandoj oni deklaras, ke ili estas ekskluziva afero de fakuloj, kio nature sekvigas malabundon de teoriaj studoj lingvistikaj.
- 10) Al Esperanto oni kondutas, kvazaŭ ĝi estus ia eksperimento kaj ludilo, kaj ne vivanta, autonoma lingvo.
- 11) La oficialigado de novaj vortoj oni konsideras nemoderna kaj ne plu aktuala kaj necesa. Sed vortaro, kiu ne estas oficiala, ne povas arogi al si oficialan karakteron. Alie ĉiu, kiu havas la necesajn monrimedojn por eldoni vortaron, povus dikti al la mondo sian propran, privatan Esperanton.
- 12) Tiel vole nevole, oni fakte subtenas la mallumajn fortojn, kiuj sekrete batalas kontraŭ Esperanto. Ĉar al tiuj fortoj estas jam klare, ke Esperanton oni ne plu povas subigi per malpermesoj aŭ ignorado. Tial ili klopodas nenigi ĝin el interne, per la detruo de ĝia ĝenia sistemo. Kaj jen iliaj bataliloj !

Komprenoble, kontraŭ ĉio ĉi ekzistas nur unu sola rimedo : Pasia defendo de la spirito de la lingvo ! Estante Akademiano mi volas fari ĝuste tion ! Tamen la defendo de la spirito de la lingvo ne estas zorgo kaj afero nur de la Akademio. Ĝi estas zorgo kaj afero de ni ĉiuj. Ni memortenu tion !

LA BUDAPEŝTAJ ESPERANTISTOJ kore invitas vin al la 3-a Vintra Esperantista Fero (28.12.1973 - 2.1.1974) en la hungara ĉefurbo kaj parte en la provinco.

Samideana kroniko

Plua el la honoraj membroj de ĈEA forpasis : d-ro Josef F o u s e k, estinta advokato. Li naskiĝis 9.8.1881 en Hostim, mortis 2.9.1973 en Přelouč (pensiula hejmo). Esperantisto de 1907, daŭre aktiva. Kiel funda konanto de muzik-scienco kaj teorio versofara li estis utila kunlaboranto de d-ro Pumpr en eminentaj tradukoj de operoj de Smetana, Dvořák, Blodek. Ŝatis tradukadi kantojn kaj mem prezenti ilin en Esperanto (foje ankaŭ en Erelsendo de Praha). "Persistemo estas lia virto plej valora por ni"-skribis pri li d-ro Kamarýt. Kaj li persistis ankaŭ en la vivo-daŭro : 92 jarojn ! - Ni ŝate tenos doktoron Fousek en nia memoro. (jm)

ĈE VINPOKALO EN DUDINCE

Kun mia edzo mi ankaŭ ĉijare partoprenis la tradician aŭtunan renkontiĝon (la 8-9an de sept.) en la slovaka banloko Dudince. Nia kara paĉjo Vána aranĝis ĝin, kiel ĉiam, tutperfekte. Alvenis ĉ.180 personoj el inter kiuj mi menciis la nederlandan geedzan paron Landheer, el GDR s-inojn Bräutigam kaj Meissner, el Pollando venis s-ro Galuszka kaj 7-persona grupo el Hungario.

Dum sabata regalo en vinberejo, kiun

Sian gravan vivjubileon ĝisvivis la 3-an de sept. Milada J o s k o v á el Praha, membrino de la revizia komisiono de ĈK ĈEA kaj komitatano de la Porpac sekcio. Al la jubileantino nian koran saluton !

Sesdekjarigis la 20.9. Jan T i c h o ŝ en Bojkovice, kunfondinto kaj longjara arkivisto de EK en Uherské Hradiště. Antaŭ kaj post la milito li gvidis kursojn en Kunovice kaj Bojkovice, prelegis kaj aranĝis ekspoziciojn.

František B i s, malnova esperantisto, membro de EK Praha, forpasis la 27-an de julio, aĝa 62 jarojn. Honoron al lia memoro !

malavare disponigis la gastiganto, registia gaja atmosfero, ke oni pogrupe hejmenrevenis nur ĉe la vesperigo.

Dimanĉe okazis kunsido de la estraro de AESSR kaj la amika kunestado.

Ni ambaŭ restis en Dudince ankoraŭ kelke da tagoj, ĝuante banadon en termala akvo, belajn ekskursojn al la montopintoj de Poľana, Sitno, al la kasteloj Antol, Detva kaj al la romantika burgruino Bzovík.

Espereble venontjare ĝis revido en vere gastama medio de nia ĉarma Slovakio.
M.Josková, Prago

(dokončení ze str.1)

ně maximálně 4 Kčs ! Má-li svaz existovat, potřebuje k tomu prostředky, protože je organizací bez trvalé dotace. Lze tedy dát do roviny vaši podporu s existencí svazu. Je-li pro výdělečně činného člověka měsíční příspěvek 4 Kčs nepřekonatelným problémem, pak by neměl raději mluvit o tom, že je esperantista a že má zájem o šíření esperanta u nás !

Pomocí místních skupin získává naše organizace trvalý přehled o činnosti ve všech místech ČSR a navíc buduje právní a existenční základ pro uskutečňování plánů, které jsou zakotveny v programovém prohlášení, přijatém na pracovní konferenci v Ostravě.

Další otázka : co bude s těmi kroužky, které se nechtějí stát místními skupinami svazu ?

Předpokládáme, že k takové krajnosti snad nedojde. Budeme se snažit trpělivě přesvědčovat a vysvětlovat i osobními návštěvami. Avšak je nutné říci, že taková seskupení prostě nebudou možná. Po

schválení úprav v našich stanovách budeme moci pracovat, tak jako ostatní organizace, buď prostřednictvím místních skupin nebo pouze soukromě. Pouze ve zcela specifických případech bude možné být členem svazu přímo, tak, jak to i dnes povolují naše stanovy. Jinak by svaz byl nucen požádat zřizovatele či příslušný NV, aby dále nepovoloval činnost EK, protože by to odporovalo stanovám svazu a dohodám mezi ČES a příslušnými ministerstvy.

Protože známe většinou naše členy a víme, že mají na mysli prospěch našeho hnutí, věříme, že se nenajde nikdo, kdo by svaz nutil k podobným opatřením.

Z.Křimský, tajemník ČES

SLOSOVATELNÉ KNIŽNÍ POUKÁZKY jsou opět v prodeji ! Cena 10 Kčs, při odběru více než 20 ks poskytujeme slevu 0,50 Kčs za kus. 1.cena - zájezd na SK do Hamburku nebo zboží v hodnotě 2000 Kčs. Všechny poukázky budou vyměněny do 31. ledna 1974 za svaz. publikace dle výběru.

SCIENCISTOJ PRI IL

Post sia objektiva traktato pri Esperanto (en "Věda a život", n-roj 6 k 7/1970) la lingvosciencistoj A. Lamprecht kaj M. Čejka (en Brno) publikigis en la sama gazeto ("La scienco kaj la vivo") n-roj 7 kaj 8/1973 ĉapitron pri aliaj projektoj de lingvo internacia. La ĉapitron finas tiu ĉi grava konkludo de la aŭtoroj:

"Se ni konsideras ĉiujn ĉi cirkonstancojn, ni devas senantaŭjuĝe konstati, ke la pesilo de justa juĝo kliniĝas favore al la jam tiomfoje kritikita Esperanto". Tiun ĉi konkludon la sciencistoj subtenas per la jenaj argumentoj:

"Ĝi (Esperanto) nome posedas sufiĉe vastan komunumon de uzantoj kaj transvivis ĉiujn reformajn projektojn kaj movadojn. Ĝi posedas taŭgan simplan kaj sinoptikan gramatikan strukturon kapablan esprimi same ankaŭ delikatajn signifonuancojn, ĝi posedas bone aranĝitan kaj plene mastr-eblan vortprovizon, kiu estas daŭre kompletigebla el fontoj internaj kaj eksteraj. Ĝi posedas, diference de la aliaj artefaritaj lingvoj, ankaŭ rimedojn por stila diferencigo kaj eblecojn por ilia plua disvolvo, kiel ni konstatas en la unua parto de nia artikolo. Tio estas donita, memkomprene, de ĝia okdekjara historio, dum kiu Esperanto komencis disvolviĝi certagrade kiel natura lingvo.

Ankaŭ en la nuntempo Esperanto estas progresanta. La tre sukcesa kongreso en Vieno en j. 1970 kaj en Londono 1971 kaj la eksperimenta enkondukado de Esp-o en lernejojn en Italio, Aŭstrio, Hungario, Jugoslavio, Bulgario kaj Pollando estas sekura atestaĵo pri tio. (jm)

LA BAMBUFLUTO. Novelaro el Sud-Vjetnamio. Fremdlingva eldonejo Hanojo 1973.

Eldonaktiveco de niaj vjetnamaj amikoj estas vere admirinda. Ok verkistoj kaj batalantoj samtempe prezentas en tiu ĉi kolekto nau siajn verkojn. Ili respegulas la sudvjetnaman ĉiutagaĵon, en kiu la kruela usona malamiko kaj ties lakeoj kumpuŝiĝas kun la rezistanta popolo.

La libro estas presita sur altkvalita papero.

LA PAPERROJ DE D-RO RAMLJAK. Eld. Internacia Kultura Servo, Zagreb 1973, 80 p. 2,50 US dol. Originalaĵoj kaj tradukoj el la verkaro de la forpasinta jugoslavia esperantisto. (k)

Vespero en Riga

Riga Esperanto-Klubo en junio okazigis vesperon dediĉitan al la traduklaborode la Esperanta poetino Milda J a k u b c o v á, latvino laŭ sia nacieco, sed vivanta en Ĉeĥoslovakio. Sia kontribuado al la esperantigo de la latva poezio estas granda.

Pri la traduka poezio de M. Jakubcová parolis M. Burgmeister. Flaĉis al la aŭskultantoj la poeziaĵoj de la latvaj aŭtoroj Aspazija, J. Jaunsudrabiņš, Fludons, Fr. Baŭda k.a. en la traduko de M. Jakubcová, kiujn prezentis la Esp. poetino E. Lippe. (M-a)

Kie la 59-a UK?


La urbo Hamburgo konstruis modernan kongresan centron, kiu antaŭnelonge estis malfermita. Tie ĉi okazos ankaŭ la venonta UK. La kongresejo situas rekte apud la stacidomo, ĝi havas subteran garaĝon uzeblan de ĉiu kongresano. Apud la kongresejo troviĝas nubskrapula hotelo kaj restoracioj, en kiuj oni povas loĝi kaj manĝi je konvenaj prezoj.

Amika vizito

Rondvojaĝante tra kelkaj orienteŭropaj landoj vizitis en aŭgusto Ĉeĥoslovakion ŝatata gasto el Japanio, k-do Kimiaki K u r i t a, instruisto pri arkitekturo, vicprezidanto de la japana MEM-sekcio kaj redaktoro de la Verda Kolombo. Krom renkontiĝoj kun la esperantistoj en Praha kaj Bratislava li gastis ĉe la sekr. de ĈEA en Mělník kaj ĉe la ĝen. sekr. de MEM T. Balda en Růvnice.

En Bratislava li estis akceptita en la Slovaka Packonsilantaro.

Sur la bildo: K. Kurita (dekstre) kun sia japana amiko.



Sur skafaldo staris Abimahelo, la unua arkitekto, en malserena silentado.

BABELTURO

Sub li vage pasumis popolo sencele tien-reen. De temp' al tempo haltis du laboristoj, komencis konversacion, sed post momento ĉesigis ĝin, svingis la manon kaj disiris. Oj oj, pensis Abimahelo, konfuzis lingvojn inter ni la Eternulo. Eĉ frato al frato jam ne komprenas. Dio punas la fieron, kun kiu ni konstruis la turon. Ho, se li prokrastus la punon ankoraŭ por kelka tempo. Ja ankau li ĝojus pro tiel brila konstruaĵo.

Nun jam neniu plu finkonstruas la turon. Ne ekzistas lingvo, per kiu la majstroj interkonsiligus pri la plua laboro. Ne ekzistas lingvo, per kiu eblus disdoni ordonojn al la laboristoj.

Abimahelo levis la rigardon al la supro. La mascaĵo diseriĝas; el fendoj jam ĝermas herbo. La turo ruinigas.

Aflikto prenis lian koron, kaj enprofundiĝis li en sian memon kaj kantis kanton de la vantecco. Fininte, li ekvidis sube senmovan popolon fiksentan al li la okulojn. Sur multaj vizaĝoj fluis larmoj.

Kaj li kompatis tiujn homojn enkarcerigitajn en la soleco de sia lingvo kaj por konsoli ilin li ekkantis nun kanzonon, auditan en sia infanaĝo.

La homoj viŝis la larmojn kaj ridete auskultis.

La arkitekto ekatentis. Kiam li finis la infanan kanton, li komencis alian, am-pasian, kaj li vidis kiel knabinoj metas la kapojn sur ŝultrojn de siaj amatoj.

Ili komprenas, diris al si Abimahelo, kaj komencis batalecan strofon. Viroj pugnigis la manojn kaj muĝe kunkantis.

Kunpremiĝis la koro de Abimahelo pro ĝojo. Oni komprenas, jen la lingvo por ĉiu komprenebla. Ĉiu ĝia vorto estas por ili ordono.

Li kantis dankanton kaj la popolo leviĝis por impeta dancu. Li kantis drinkokanton kaj la amaso kvazau laŭ ordono ĵetiĝis al keloj por suprenruli la restintajn barelojn. Kaj li aliĝis al la amuzo, kiu kvietigis nur ĉe mateniĝo.

La sekvintan tagon li ascendis la plejsupron de la skafaldo kaj prenis profundan enspiron. De sur la turo disaŭdiĝis konstru-elana kanto.

La dormantoj vekigadis kaj ĉagreno rigardis al la konstruaĵo.

Abimahelo ekkantis ankoraŭ pli alte kaj pli forte. El lia kanto radiis la konstruata entuziasmo kaj la kredo je morgaŭ. Al li mem streĉiĝis muskoloj kaj la manoj memvole palpis je hakilo.

La homoj sulkigis la brovojn kaj unu ekkriis:

"Tiu ĉi muziko estas nekomprenebla".

"Blovas el ĝi fremdeco", diris alia en sia lingvo.

Abimahelo vidis, kiel la homoj ekstaras. Ili komprenis la ardan alvokon, li pensis kun grandega ĝojo kaj laŭ la kantaritmo frapis trabon per la hakilo.

"Ĉu tio entute estas muziko?" diris iu en sia lingvo.

"Li kantas pro si kaj por si".

"Li apartiĝis de la popolo!" ekkriis unu kaj kliniĝis por ŝtono.

La arkitekto kun ĝoja mirego observis, kiel la homoj kuspas la manojn kaj kuregas al la konstruaĵo. La konstruo de tiu ĉi turo estos finita!

"Falsa profeto!", ili kriis, ĉiu en sia lingvo, kaj ĵetis ŝtonojn al la kantisto, la lastajn ŝtonojn, kiujn levis la homa mano ĉe la konstruado de Babelturo.

El la ĉeĥa tradukis A. Beďnařík

(Tria premio en la literatura konkurso de Starto, fako traduka prozo)

LA ĈEFVERKO DE KOPERNIK, kvankam verkita en la j. 1515-1533, aperis nur en 1543 sub la titolo "De revolutionibus orbium coelestium". Ĝia manuskripto fine trovis sian lokon en Prago, en la biblioteko apartenanta al grafo Nostic, kie ĝi kuŝis nerimarkite pli ol 150 jarojn. La unua mencio pri tiu ĉi libro aperis en 1788! En 1953 la ĉs. ŝtato transdonis la verkon al Pollando. Nun ĝi troviĝas en la Jagielona Biblioteko en Krakovo. La verko, kiu revoluciigis la koncepton pri la strukturo de la universo kaj donis bazon por la nova astronomio. Z. Matyková

Korespondi deziras

LITOVA SSR - Laima RUDAITYTE, Drobes 81-1, 233002, Kaunas-2 o Juozui BANIONIUS, Jures st., Kapsuko raj. o Raimondas BUZELIS, Vilties 18-2 235 306 Panevežis o Rima ANDREŠIUNAITĖ, Pelkey 43, 235306, Panevežis o St. RAULY-NITIS, Skirsnemunes, 234431, Jurbako r. o Laima VAILIONYTE, Gerosios Vilties, 20-97, 232015 Vilnius o Nijolja VIDURITE, Kapsukasa 99a/9, 235640, Plunge. (Ĉiuj mezlernejanoj 15-18 j.)

G D R - Karl Jos. Th. BANNERT, instruisto pri lingvoj kaj tradukisto, D 8801 Zittau 2-Land, Hartauer Str. 15, Oberlausitz, Bz. Dresden o Roswita BERGER 16j, Platz des Friedens 5, 9202 Frauenstein o Carmen GERSTEN 17j, Wassergasse 5 B, 9202 Frauenstein.

POLLANDO - Longina WŁODARSKA 17j. 58-540 Karpacz ul. Brzeznie Kartonoskie 10, pow. Jelenia Góra o Gregora SCHEFFEUR, 20j. str. Szymanovskiego 29, PL-59-900, Zgorzelec.

HUNGARIO - Rozália LUGÓSI, flegistino, 6800, Hódmezővásárhely, str. Bocskai 1.

BULGARIO - Evgenij GEORGIEV 18j. str. Bačo Kiro, 35 II. koop. Sofia 2. Kun gesanoj el ĈSSR.

RUMANIO - M. P. DUNŢEANU 42j. PO Box 502 Suceava 6, kun abelbredistoj o Nemteanu CORNEL 22j. poŝtisto, str. Purice 3, Saveni, jud Botoşani, interes. bk. o fino Jeni CUCIUROVSKI 30j. str. M. Viteazu 16-A-2, Suceava 1 o Martinescu MIHAI 19j. lernanto, str. Papetariei 9, Radauti - Bucovina o fino Mariana SPAC, 18jara lernantino, str. Transilvaniei 4, Vatra - Dornei.

Rememore pri Bozkov

Kiam fari dum la suna sabato? Preskaŭ du horojn daŭris nia vojaĝo ĝis ni fine trovis la hotelon Spálov, kie bonvenigis nin 40 partoprenantoj de la renkontiĝo de naturamikoj en Bozkov apud Semily.

Survoje ni haltis ĉe bela romantika dometo super la rivero Kamenice. Antaŭ ĝi ŝtona tablo kun benkoj kaj granda ŝtona fiŝujo. La posedanto, aranĝanto de

la renkontiĝo Z. Myslivec, invitis nin internen por trarigardi grandan jezukripon preskaŭ antaŭ cent jaroj manfaritan de lia avo.

Sur la urbeta placo ni fariĝis hazardaj atestantoj de geedziĝa ceremonio. Kaj poste sekvis vizito al dolomita groto en Bozkov, la dua plej granda en Bohemio. La finan parton de nia ekskurso ornemis bela arbara vojeto, kiu gvidis nin al ĉarma forstodomo. Apude jam preparita ŝtiparo por bivakfajro.

Post momento aŭdiĝis blovinstrumenta muzikado kaj multaj el ni kunhelpis kanti la ĉefajn kaj esperantajn kantojn... Vespero proksimiĝis. Tra mallarĝa arbarvojo ni malsupreniĝas al stacidomo Jesenný. La vagonaro veturigas nin al la hotelo Spálov, kie jam atendas nin niaj aŭtomobiloj.

J. Rybáčková

Vyžit esp. filmy!

V našich kroučích či u jednotlivců bývají často uloženy nebo zapůjčeny zahraniční esp. filmy, o kterých ostatní LK nevědí a nemohou je využívat. Vyzýváme proto všechny skupiny a jednotlivce, kteří takové filmy vlastní, aby je ohlásili svazu. Nebude tím nijak dotčeno vlastnictví majitelů, pouze se zvýší využití filmů.

V dopise svazu uveďte: 1) název filmu, 2) výrobce a rok výroby, 3) šířku v mm (35, 16, 8), 4) zda jde o film barevný či černobílý, 5) délku v metrech nebo minutách, 6) kde je film uložen a odkud si jej lze vypůjčit, 7) výši požadované úhrady za zapůjčení (vč. poštovného a balného).

VEŠKERÉ ZÁVAŽNÉ DOKUMENTY týkající se historie a aplikace E-a v ĈSR, zejména ve vědě (knihy, časopisy, listový materiál, korespondenci ap., příp. kopie) zasílejte na adr. svazu, p. schr. 8, 120 21 Praha 2.

LINGVA EKZERCISTO BONVENA. Nia legantino B. Metznerová skribis al ni: "Mi tre ĝojis pro apero de LE, kiun mi trovas tre utila precipe por eviti la ĉefismojn.."

S T A R T O - eldonas ĈEA, p. k. 8, 120 21. Aperas okfoje jare. Resp. redaktoro O. Knichal. Red. komitato: ing. E. Felix, J. Mařík, ing. F. Sviták. - Dohl. pošta Praha 07, sniž. pošt. popl. pov. ĈP Praha j. z. P/1-2283/1971. Ĉ. 6. předáno do tisku 13.9.